

Ponteto

(Bulteno de Esperanto-Ligo en Regiono Kantoo)

Majo 2012 N-ro 252

第 61 回

関東エスペラント大会

主催：関東エスペラント連盟 後援：財団法人日本エスペラント学会

日時：2012年6月16日(土)～17日(日)

場所：箱根町湯元 ホテル箱根路開雲

参加のお願い

現在の参加者は、60 人ちょっとです。宿泊は、まだ 20 人くらいです。今年は、折角箱根の良い温泉ホテルを会場に取ったので、参加者は不在参加も含めて 100 人、宿泊は 50 人(この人数で予約)はほしいところです。ぜひ、通いでなく、一緒に泊まって、懇親会も含めて楽しみたいものです。よろしくお願いします。

今の状態では、来年はまた都内での 1 日開催かなと、悲観的です。

1. ネパールからのお客 Bharat Ghimire さんのビザが取れたので来日は確定的です。彼の講演は土曜日の午後です。
2. 記念品の「日本からの報告15」は、432 ページの東日本大震災特集です。これまでの 2 倍以上の厚さになります。すでに印刷屋に原稿を渡しました。
3. 小田原城遠足では、小田原エスペラント会がエスペラントでの説明を準備しています。
4. その他の準備は、着々と進んでいます。あとは参加者が多くなることを願うだけです。


出席できない人は、不在参加を！

Leteroj de Tigro (3)

Ĉina-japana rilato en Honkongo

Tigro (bill.m.mak@gmail.com)

La 8an de majo 2012



Nekutima gvidlibro pri Honkongo de Wani Yukio (1996)

– kun rakontoj pri japana okupado de Honkongo.

Dum la pasintaj monatoj kiam mi laboris en la universitato en Honkongo, vane mi serĉis apartamentojn. Finfine mi devis tranokti en hoteloj, temploj kaj hejmoj de parencoj kaj amikoj kiel senhejmullo. Ŝajnas ke en Honkongo tute mankas apartamentoj ekde 2010 kaj post la tsunami pasintjare, onidire la bonkvalitajn apartamentojn nun okupas la japanoj. Ĉu vere? Ĉu japanoj el Kantoo fuĝis al Honkongo, mi ne povas certigi. Sed almenaŭ mi konas japanan profesoron, kies hejmo estis Fukuŝima kaj li decidis resti en Honkongo.

Laŭ japana amiko mia kiu loĝas en Honkongo jam dum jarcentoj, la vivkondiĉo de Honkongo, krom la altkotizo de loĝado, estas tre favora

al japanoj. Honkongo estas moderna, sekura kaj sufiĉe pura loko. La vetero estas ankaŭ bona - mankas neĝo dum vintro kaj ne mankas plaĝoj kaj belaj insuloj por la someraj plezuroj. Tre plaĉas al mi persone la verdaj montoj kiuj ĉirkaŭigas la urbon. Se oni subenrigardus el la aviadilo alvenante en la urbon, oni tuj rimarkus ke Honkongo estas fakte plejparte verda kaj blua, konsistante el plejparte montoj, insuletoj kaj maro. En la imago de multaj eksterlandanoj, Honkongo ekzistas kiel cementa arbaro kun neonaj lumoj; sed ĝi estas paradizo por tiuj kiuj vere konas ĝin.

Multaj miaj japanaj geamikoj tre bone konas tion, dank'al la detalaj japanlingvaj gvidlibroj. Sed japanaj turistoj ŝatas Honkongon ankaŭ pro aliaj kialoj – la varoj estas buntaj kaj malmulte kostaj, butikumado estas amuza kaj homoj estas amikaj, precipe al japanoj. Japana kulturo estas adorata en Honkongo, kiel tra la mondo ĉitempe; junuloj pasigas sian junecon legante manga-ojn, spektante japanajn anime-ojn kaj dramojn. La japana lingvo estas konstante la dua preferata fremdlingvo en Honkongo, krom la angla. Por la plejmulto de plenkreskuloj, Japanio estas revinda turisma celloko kaj interalie japana manĝo estas ĉiam bonvena. Resume honkonganoj amas ĉion japanecan.

Tamen la rilato inter honkonganoj kaj japanoj ne estas ĉiam bona. Precipe inter la maljunuloj, tre negativaj sentoj kontraŭ japanoj ankoraŭ restas ĝis hodiaŭ – kaj ne senkiale.



Dum tri jaroj kaj ok monatoj (25^{an} Decembro, 1941 - 15th Aŭgusto 1945), Honkongo estis sub Japana militarisma regnado. La popolnombro de Honkongo estis 1.6 milionoj antaŭ la milito kaj post la milito, ĝi falis ĝis nur 0.6 miliono. Kien la miliono da honkonganoj iris aŭ malaperis? Kio okazis dum tiuj tri jaroj kaj ok monatoj?

La historio de japana regnado de Honkongo estas preskaŭ forgesitaj – nemenciata en tekstolibroj aŭ en Hongkongo aŭ en Japanio. Sed iel la kolektiva memoro persistas – ĉar la frazo “tri jaroj kaj ok monatoj” 三年零八個月 en la kantona lingvo por la honkonganoj signifas nedireblan mizerecon kaj suferon. Eĉ hodiaŭ, multaj maljunuloj kiuj

travivis tiujn jarojn nur povis plori, sen eĉ unu vorto pri siaj tiamaj spertoj. Miaj geavoj nenion diris, nek al miaj gepatroj, nek al mi.



La mondfama “Hotelo Peninsula” fariĝis la ĉefstabejo de la japana milita registaro



Dum la pasinta jardeko, kaj japanaj kaj honkonganaj historiistoj ekinteresiĝis pri tiu ĉi doloriga temo kaj decidis malfermi la nigran, pezan pordo de memoro antaŭ ol la koŝmara memoro eterne neniĝas. La brutaleco de la japana regnado de Honkongo dum la tri jaroj kaj ok monatoj surfaciĝas kiel scenoj de terurromano. La “malaperinta” miliono da honkonganaj estas iel forigitaj al ĉeflanda Ĉinio, komence per la politiko de “rekondukado” kaj poste per devigaj metodoj. Por plenumi la ordonojn “malŝargi la situacion de malriĉeco kaj manko de manĝaĵoj en Honkongo”, japanaj soldatoj hazarde kaptis homojn en la stratoj, ĉefe malsatajn virojn, metis ilin en boatojn kaj sendis ilin ien, ofte al morto.



La Urbestra Domo de Hong Kong – Notu la japanecajn tegmentojn kiujn rekonstruis la japana arkitekto Seichi Fujimura en 1942.

Por la siatempa japana registaro, Honkongo estis konsiderata ne kiel kolonio (kiel Tajvano), sed kiel strategia celloko milita – pro tio, honkonganaj estis kvazaj objektoj, ne homoj. La 8^{an} Decembro, 1945,

la tago post la japana atako de Perla Haveno, Honkongo estis ataktita senanonce kaj post la rezignado de la britoj, Honkongo fariĝis la unua kaptita regiono en Azio dum la Pacifika Milito. Dum la postaj monatoj en Hongkongo, civitanoj estis masakritaj, dekmiloj da virinoj perfortitaj kaj la ceteraj suferis en mortiga malsateco.

Ĉiuj honkongaj maljunuloj konas iujn kiuj iel malaperis kaj neniam revenis hejmen. La timego estas nedirebla, nepriskribebla. Homoj kiuj ne kapdeklinas al la soldatoj estis tuj frapitaj, se ne mortigitaj per la bajonetoj. Japana fariĝis devigita lernolingvo. Eĉ stratnomoj fariĝis japana.

Tiuj kiuj travivis tiun tempon forgesu tian malagrablan memoron. Tamen kial la memoro persistis?

La kialo, interalie, temas pri mono.

Post la invado kaj kaptado de Honkongo, la japana milita registaro malpermesis la uzon de honkongajn dolarojn kaj devigis ke honkonganoj konvertu honkongajn dolarojn en japanajn militajn enojn. En Januaro, 1942, la kurso estis du honkongaj dolaroj je unu milita eno; en Junio samjare, la kurso subite fariĝis kvar honkongaj dolaroj je eno. Je la fino de la milito pro inflacio la militaj enoj fariĝis preskaŭ senvaloraj. Tiel la japana registaro forrabis 5.7 bilionoj da honkongaj dolaroj de la honkonganoj kaj la plejmulto de tiu mono kontribuis al la milito kontraŭ ties gefrataj ĉinoj en ĉeflanda Ĉinio!



100 el la 540,000,000 militaj enoj kion ankoraŭ konservis honkonganoj ĝis hodiaŭ. Dum la pasinta du jardekoj japanaj advokatoj kaj voluntuloj klopodas prezenti la kazon al la japana registaro.
(<http://www.geocities.jp/afyokohama128/04honkon.html>)

Ordinare post la milito, la malvenkinto rekompencu la perd-kotizojn diversajn. Sed pro la usona realpolitiko de ekonomia subtenado de Japanio kontraŭ komunisma mondo dum la Malvarma Milito, la usona registaro konvinkis la britan registaron ke la honkonga kolonia registaro forlasu la rajton de rekompencado. Sen konsento aŭ eĉ scio de honkonganoj, la bilionoj da militaj enoj fariĝis senvaloraj paperoj, kiuj multaj honkonganoj ankoraŭ posedas ĝis hodiaŭ. Nun, pli ol 60 jaroj post la koŝmara periodo, la japana registaro ankoraŭ rifuzis traktas la problemon, malgraŭ la ĉiujara protesto de iuj maljuniĝantaj honkonganoj.

Dum tiu sama periodo, la plejmulto de japanoj suferis malriĉecon pro la elspezo de milito kaj poste ankaŭ atakojn de la aliancaj armeoj – eventuale la du atombombojn en Hiroŝima kaj Nagasaki. Multaj japanoj sentis ke japanaj civitanoj estis viktimoj de la milito. Sed fakte, por la centmilionoj da azianoj kiuj suferis mizere pro la milito, la japanoj kiuj vole-nevole vivis kaj laboris en la siatempa Japanio fakte kontribuis diversmaniere al la milito kaj la falo de la du atombomboj signifis la finon de ties mizera sufero.

La kunekzistado de tre pozitivaj kaj tre negativaj sentoj kontraŭ Japanio inter honkonganoj estas ŝajne ironia. Oni tamen ne forgeus ke honkongo estas ankoraŭ unu el la plej liberaj regionoj en la mondo, ĉu por ekonomia aktivado, ĉu por esprimado de diversaj politikaj opinioj. Pro tio, diversaj sentoj kaj opinioj kunekzistas kaj kunekzistu. Kiam ajn okazis konflikto inter Japanio kaj Ĉinio, honkonganoj estis ofte plej esprimemaj, ĉu pro la ŝanĝo de enhavo de japanaj lernejoj tekstolibroj, ĉu pro la teritoria disputo. La historikajn problemojn oni devas kune objekte konfronti, ne fantazie sed realisme. Ekzemple, kiam ajn oni

organizas pac-kunvenon, bedaŭrante pri la falo de atombomboj kaj la morto de centmiloj da japanoj, oni ne forgesu ankaŭ la centmilionojn da ne-japanoj kiuj senkaŭze perdis siajn posedaĵojn, gepatrojn, gefilojn kaj eĉ vivojn.

Poemo

Varman mondon sen nukleaj centraloj

Kiam mi scias, ke elektro venas de nukleaj reaktoroj,
Kial oni uzas tiajn danĝeraĵojn, mi demandas min,
kaj mi sentas min malvarma.
Kiam mi scias, ke elektro venas de termoelektraj reaktoroj,
ĉar oni uzas petrolon kaj karbon,
mi sentas min ne varma.
Kiam mi scias, ke elektro venas de hidroelektraj reaktoroj,
kvankam mi ne ŝatas betonajn digojn,
mi sentas min varmeta.
Kiam mi scias, ke elektro venas de sunenergio,
ĉar ĝi estas beno de la naturo,
Mi sentos min varma tutkorpe.

En la bela, maja suno mi sentas vivĝojon,
nur sciante, ke ĉiuj nukleaj reaktoroj haltis.
Kiam ĉiuj nukleaj reaktoroj malaperos,
Kiel varma mi sentos min!
Kiam ĉiuj nukleaj centraloj malaperos en la mondo,
Kiel varmaj kaj trankvilaj ĉiuj sentos sin!
Ni plu batalu senlace,
por ke ni ĉiuj vivu feliĉe
por ke ĉiuj vivaĵoj vivu plene.

(Versita la 6an de majo 2012)